



TAGORDO por la 31a ĝenerala kunveno de Esperanto Nederland,

okazonta la 21an de majo 2022 - de 10.30 h ĝis 13.00 h,

en la ejo Floor, Dorpsstraat 36, 6741 AL Lunteren

Membro povas reprezenti maksimume 2 aliajn membrojn, se li/ŝi/ri transdonis subskribitajn mandatojn al la registranto ĉe la komenco de la kunveno.

Alveno ekde 10.00 h

1 Malfermo de la ĝenerala kunveno je 10.30 h.

Rememoro de la forpasintaj membroj.

Nomumi du personojn por la kalkulado de la voĉdonoj.

2. Fikso de la tagordo kaj envenintaĵoj.

3. Protokolo pri la 30a ĝenerala kunveno en 2021

4. Agadraporto pri 2021

5. Financaj raportoj pri 2021

5.1. Raporto de la kaskontrol-komisiono.

5.2. Rezultkonto pri 2021 kun klarigoj

5.3. Bilanco je 31-12-2021

6. Proponoj

6.1. Propono de la estraro: fikso de la kotizoj por 2023. La estraro proponas ne sanĝi la kotizojn.

6.2. Buĝeto kaj Laborplano - 2023

6.3. Plano por informado

7. Elektoj

7.1. Arbitracia komisiono

Anneke Schouten-Buijs estas membro de la komisiono, ĝis 2022. Ŝi estas reelektebla por nova tri-jara periodo. La aliaj du membroj estas: Johan Swenker (2020-2023) kaj Marc van Oostendorp (2020-2023)

7.2 Estraro

7.2.1 Elekto de prezidanto. Nova prezidanto estas serĉata.

7.2.2 Elekto de kasisto. La nuna kasisto Loes Demmendaal, estas reelektebla. Estas ŝia tria periodo. Unue la membrokunveno devas doni konsenton ke ŝi estas reelektebla por la tria periodo. Post tiu konsento ni elektos la kandidaton.

7.2.3 la estrarano Andries Hovinga demisias kaj ne estas reelektebla.

7.2.4 Elekto de aliaj estraranoj. Kandidatoj estas serĉataj.

Peter van Noorden kandidatas por la estraro.

7.3. Kaskontrol-komisiono

La kaskontrolkomisiono por la jaro 2021 estas Simon Smits kaj Ronaldo Nobel. Rezerva membro estas Peter van Noorden. Por la jaro 2022 restos Ronald Nobel, plia membro kaj rezerva membro estas serĉataj.

7.4 Komitatano A ĉe UEA

Kandidato estas serĉata.

08. Fenikso

La redaktoro Foppe-Klaas Hovinga, informas nin pri la redaktado kaj presado de Fenikso.

09. Informado pri diversaj temoj:

9.1 Germana Esperanto Kongreso, okazos en junio 2022 en Oldenburg/Germanio. Esperanto Nederland kunlaboras en tiu ĉi kongreso por subvencio kadre de Erasmus+.

9.2. Kultura tago

9.3. Eventuale informado pri aliaj temoj

10. Jubileantoj

Ni honoras la membrojn, kiuj festas sian 50-jaran membrecon.

Mi mencias la membrojn, kiuj antaŭ 25 jaroj aliĝis al la asocio

11. Verloren van Themaat-premio. La ĵurio anoncas la rezulton pri la jaro 2021.

12. Ronddemandado.

13. Fermo

Ineke Emmelkamp, sekretario

Groningen, la 28an de januaro 2021